# AVANCO

2/2001
Junio (XII-a jaro, Nro. 2)

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio

# Dankon, Meksiko!



5-a Tut Amerika Kongreso de Esperanto



Kuriero de la

## Nova Mondo

Tagbulteno por la partoprenantoj de la
5-a TAKE - Meksikurbo - 2001

## Estimataj:

Vi trovos, ke ĉi numero de Avanco estas preskaŭ dediĉita al la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazinta en Meksikurbo dum la monato aprilo.

Ĝi konsistigis mian unuan esperantan kongreson ekster Kubo. Pardonu, mi ankoraŭ estas kvazaŭ «ŝokita» de la afero. La Kongreso estis granda triumfo kaj por Meksika Esperanto-Federacio kaj por ĉiuj amerikaj asocioj. Kaj plia bona novaĵo estas, ke la venonta TAKE okazos en Kubo!

Pardonu ankaŭ (mi ja scias, ke Vi ĉiuj estas bonkoraj) ke ĉi tiu numero de nia nacia bulteno aperas malfrue pro tro da profesia laboro.

Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne viveltenas per Esperanto...

Via Redaktoro,
Mag. Alberto García Fumero

## NACIA ESTRARO

***Maritza Gutiérrez González**
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon./Historio, Ameriko, **Avanco**, **La Noktuo** kaj **Universo**

***Martha Alonso Gutiérrez**
Financoj./Resp.pri administraj aferoj

***Alberto García Fumero**
Informado./Hejmpaĝo

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Zorgas pri artaj k. klerigaj aranĝoj./Biblioteko

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado k. ILEI-Sekcio.

***Manuel Rodríguez Rábago**
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj
*Roberto Torres Alvarez
Atento al alilandaj e-istoj.
*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.
*Carmen A. Hernández Socarrás
Faka Agado

**XII-a jaro, nro.4 2/2001, (speciala). Aperas 4- foje jare (mar., jun., sep. kaj dec.) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@lp.etecsa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Alberto García Fumero / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u /** **Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).**

# Unua Nacia Seminario pri Informado:
# Sancti Spíritus 2001



De la 9-a ĝis la 11-a de marto oni okazigis en la urbo Sancti Spíritus la Unuan Nacian Seminarion pri Informado. La seminario estis gvidita de la Sekretario pri Informado, Alberto García Fumero, kaj de la Ĝenerala Sekretario, Juan Ramón Rodríguez. Kvankam oni nomis ĝin seminario, fakte temis pri viglaj diskutoj kaj analizo de nia nuna propaganda agado.

Oni komencis per «eltrovo» de psikologia profilo de esperantisto, tial ke oni povu mediti pri tio, kiaj homoj estas altiritaj kaj de Esperanto kaj de la interna ideo. Poste oni analizis la eblajn kialojn de la ŝajna malsukceso de la internacia, kaj kial kelkaj homoj timas Esperanton. Evidentiĝis, ke multaj homoj tre strikte identigas lingvon al kulturo, kaj timas, ke Esperanto forbalaos ĉiujn aliajn kulturojn.



Aparta atento estis dediĉita al la argumentoj poresperantaj uzataj de aktivuloj, ofte iom troigitaj pro entuziasmo kaj neĝusta konsidero, ke kio evidentas al ni, same aspektos al aliaj. La plej oftaj argumentoj estis analizitaj, kaj donitaj informoj rilate al la loko de Esperanto inter la lingvoj, elstaraj homoj favoraj al la internacia, aŭ al la ideo pri internacia helplingvo, ktp.

Dum parto de la diskuto la Sekretario pri Informado rolis kiel «advokato de la diablo», kaj «enkarnigis» homon altirita de la ideo pri internacia helplingvo, sed opinianta tion, ke la angla solvos ĉiujn problemojn, kaj oni provis konvinki lin, kio konsistigis tre interesan ekzercon.

Unuanima opinio de la partoprenintoj estis, ke bezonatas pli da informa laboro pri historio, pri la movado, kaj pri Esperanto kiel kulturaĵo flanke de la instruistoj. Oni same petis, estontan, konstantan okazigon de tiaj seminarioj.




***Alberto García Fumero***

# *Kiu diras, ke Esperanto ne estas kulturaĵo?*



La Ministerio pri Kulturo decidis, dum la ĉi-jara Provinca Kultura Semajno en Camagüey (de la 1-a ĝis la 7-a de februaro), premii la Provincan Filion de Kuba Esperanto-Asocio (kolektive) kaj ĝian Prezidanton J. L. González Santillán (individue) per la diplomo «Aniversario 487 de la Fundación de la Villa del Puerto del Príncipe» (487-a Datreveno de la Fondiĝo de la Vilaĝo Haveno de la Princo).

La Provinca Filio Camagüey troviĝas inter la 10 lokaj pli bone laborantaj institucioj, kaj Santillán estas unu el la kvar elstaruloj.

***Laŭ informoj el la provinco***

# *Jam Kuba Esperanto-Asocio estas 22-jaraĝa!*

La 16an de junio KEA fariĝis 22-jaraĝa, okazo kiun ni solene kaj feste celebris en nia sidejo en Havano. Jam antaŭ tiu dato, la esperantistoj el la ĉefurbo faris traurban promenadon en Esperanto kaj vizitis la memortabulon de Zamenhof situanta en historia kaj tre vizitata loko de la Malnova parto de la urbo.

Tra la tuta lando, la diversaj filioj de KEA okazigis kaj ankoraŭ okazigos diversajn aranĝojn, nome ekspoziciojn kaj tendumadon en la orienta provinco Santiago de Cuba dum tiu ĉi monato .

Ni profitis la okazon por diskonigi informojn pri la datreveno per nacia radiostacio vaste aŭskultata tra la tuta insulo.

Nuntempe, KEA organizas la 3an kulturan festivalon de Esperanto okazonta inter la 28-a kaj la 30-a de novembro ĉi- jare en la orienta provinco Camaguey.



***Maritza Gutièrrez González***
***Prezidantino de Kuba Esperanto-Asocio***

# Dankon, S-ro Corsetti!

Jen vidu, kion ni ricevis el Interreto...

***La Redaktoro***

*De: Renato Corsetti [renato.corsetti@esperanto.org]*
*Enviado: miércoles 6 de junio de 2001 11:34*
*Para: Roberto Molina Gálvez*
*CC: kubesp@ip.etecsa.cu*
*Asunto: Mesaĝo al Kuba Esperanto-Asocio*
*Mesag'o por Kuba Esperanto-Asocio*

*Karaj kubaj esperantistoj,*

*estas por mi vera plezuro kaj granda honoro havi la eblecon sendi al vi bondezir-mesaĝon okaze de via ĉiu-jara celebro de la dat-reveno de via asocio.*

*Vi rajtas esti fieraj pri via laboro kaj pri via asocio. Multaj tre pli malnovaj asocioj tra la mondo estus kontentaj, se ili estus farintaj duonon de via laboro en duone sam-malfacila situacio.*

*Ekzemple, Universala Esperanto-Asocio, kiu sekvas vian laboron kun atento, provos baldaŭ instigi ĉiujn landajn asociojn konstrui same bonajn rilatojn kun la propralanda UN-asocio, kiajn vi havas.*

*Tio okazos en la kadro de novaj kampanjoj de la tutmonda Esperanto-movado, kiuj celos rekte aliri la Unesko-komisionojn, la Ministeriojn pri Edukado kaj la UN-asociojn de la tuta mondo por demandi ilin, kion ili intencas fari por realigi la rezoluciojn de la Ĝenerala Asembleo de Unesko kaj de la Asembleo de Neregistaraj Organiaĵoj en Seulo favorajn al Esperanto.*

*Mi estas certa, ke la kubaj esperantistoj kunlaboros ankaŭ tiurilate.*

*Karaj geamikoj, mi ne volas longe tedi vin. Mi volas nur diri al vi, ke mi estas certa, ke la progreso de Eperanto venos nur per la laboro de simplaj esperantistoj, kiel vi kaj mi, kaj pro la bona volo de homoj en landoj malgrandaj kaj neregantaj, kiel Kubo.*

*Multajn sukcesojn al via renkontiĝo kaj tre amikajn salutojn*

*Renato Corsetti*
*UEA, Vic-prezidanto de UEA*

# *Karaokeo en Esperanto!*

(Novaĵo ricevita el Interredaktore)

Ĝoje mi informas vin pri apero en Esperantujo de granda novaĵo: Karaokeo en Esperanto ĉe ***http://www.rantac.com.br/users/alls*** !



Nun vi jam povas pere de interreto aŭskulti muzikon kaj kunkanti en nia lingvo, sekvante la kantotekstojn. Vizitante la retpaĝejon de Pinarbara Esperanto-Grupo (Espírito Santo do Pinhal - SP, Brazilo), vi povos ricevi pliajn informojn pri la senpage elŝutebla programaro kaj registri tutmonde famajn klasikajn kaj modernajn kantojn en nia lingvo. (***http://www.rantac.com.br/users/alls***).

Krom nia propra retejo, ni sukcese aperigis la samajn karaokeojn en la plej granda perejo de Sudameriko, tio estas, "Universo On Line" (***http://www.uol.com.br***). Por ke vi povu taksi la grandecon de "Universo On Line", ĝi havis 6,1 bilionojn da vizitantoj nur en la unua trimestro de 2001; ĝi posedas unu milionon da abonantoj en 200 urboj tra la tuta Sudameriko, inkluzive Argentinon, Venezuelon kaj Kolombion. Ĝi aktivas ankaŭ en Meksikio kaj Usono por la hispanlingva komununo.

Nia karaokeo aperas en la sekcio "muziko" ĉe la adreso ***http://www.uol.com.br/cante/*** kun granda elstarigo al Esperanto. La graveco de tiu okazaĵo estas la fakto, ke miloj da neesperantistoj ĉiutage vizitas ĝin por elŝuti naciajn kaj internaciajn karaokeojn, inter ili, la Esperantajn muzikaĵojn, kio multe helpas en la disvastigado de Esperanto.

Tutcerte la uzado de la programo "Cante" (Esperante: "Kantu") senpage elŝutebla de tiu retejo kaj la Esperantaj karaokeoj povas multe helpi en la ĝojigo de Esperantaj festoj kaj renkontiĝoj, kaj ankaŭ en la lernado de la Internacia Lingvo.

Mi kalkulas, je via vizito al la retpaĝejo de Pinarbara Esperanto-Grupo (***http://www.rantac.com.br/users/alls***) kie, krom la karaokeoj, vi trovos ankaŭ gvidliniojn en Esperanto por instali kaj la muzik-dosierojn kaj la programaron "Cante", aŭ al la ttt-ejo de Universo On Line (***http://www.uol.com.br/cante/***) en la portugala lingvo.

Se vi volas kunlabori en tiu laboro, vi povas sendi al ni kantotekstojn kaj eble rilatajn mid-dosierojn, por ke ni povu karaokeigi ilin kaj pligrandigi la provizon de karaokeoj en Esperanto por la tuta esperantistaro.

***Antonio Luís Lourenço dos Santos***
***alls@rantac.com.br***

# *Magio en Meksiko!*



Certe kio okazis en Meksikurbo, de la 15-a ĝis la 21-a de aprilo, 2001, estis afero magia, eĉ mirakla... sed eble pli bone estos, ke mi komencu per la komenco mem.

Jen: temas pri la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, festo kaj triumfo ŝuldita al nekredeble malgranda Loka Kongresa Komitato, konsistanta el S-ino Leonora Torres y Torres, Prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio, «Leonora la I-a», Inĝ. Angel Segura Peralta (Sekretario), D-ro Michael Porter, «Mike» (Organizado), D-ino Estela Gracia García, «Estelita» (Kasistino), Inĝ. Fidel Figueroa (Organizado) kaj Leonora González, «Leonora la II-a» aŭ simple «Leonorita» (Turismaj Aferoj). Pri kiom da kaprompoj ili devis travivi antaŭ, dum kaj post la Kongreso, kaj kiom obstine ili laboris, povas atesti tiu ĉi redaktoro... sufiĉos diri, ke ili sukcesis havigi al ni kiel Altan Protektanton al la Deputitino Yolanda de las Mercedes Torres kaj kiel Honoran Prezidanton al D-ro Miguel León-Portilla, mondfama aŭtoro de la libro ***Visión de los Vencidos*** pri la Konkero de Meksiko fare de la hispanoj, kies esperantlingva traduko, ŝuldita al la plumo de Juan Jacobo Schmitter, estis vendita en la Kongreso...

La du reprezentantoj de Kuba Esperanto-Asocio, mi kaj la Ĝenerala Sekretario, Juan Ramón Rodríguez, devis flugi al Meksiko jam semajnon antaŭ la Kongreso, pro tio ke ne estis flugbiletoj por la postaj tagoj. Atende de ni ĉe la flughaveno estis la Prezidantino mem, kiu gastigis nin en sia hejmo dum tiu freneza semajno, kaj de tiam turniĝis en veran gardanĝelon. La ceteron de nia restado en Meksiko gastigis nin ĉarma geedza paro konsistanta el la Licenciulino Virginia Jaramillo, kiu respondecas pri edukaj, sociaj kaj kulturaj aferoj antaŭ la politikaj instancoj de la urbero Cuauhtémoc, kaj sia edzo José Luis Muñoz, ankaŭ laboranta tie. Ili du superŝutis nin per komplezoj kaj donacoj. Volu Dio, ke iam povu nin iel kompensi ilin pro tiom da zorgoj, kiujn ni metis sur iliajn ŝultrojn.

Dimanĉe la 8-an ni du partoprenis kunsidon de la Loka Kongresa Komitato, kie ni konatiĝis kun la aliaj anoj de la teamo, kaj kompreneble metis nin je ilia dispono. Bedaŭrinde krom atendi ĉe la flughaveno esperantistojn kaj helpi al Mike finpretigi la Kongresan Libron, ne tro povis esti farita de ni, kvankam inter aliaj aferoj Leonora profitis la okazon aranĝi intervjuon ĉe la prestiĝa ĵurnalo «Excelsior» kaj ankaŭ ĉe la radiostacio «Radio Educación», kaj malfermi ekspozicion en la Klubo de Ĵurnalistoj.

Do mi havis okazon ĝui la Sanktan Semajnon en lando profunde religia, kaj mi konfesas, ke neniam antaŭe mi vidis tiom da fervoro. La tradiciaj plektaĵoj el palmofolioj, kiujn oni aĉetas dum la Palma Dimanĉo, kaj la memorindaĵoj vendataj dum la Sankta Semajno estas veraj majstroverkoj.

Jes, jes, mi revenos al la Kongreso: kongresejo estis la Hotelo Bamer, ne tro multekosta hotelo kvazaŭ strategie lokita proksime de la plej interesaj vidindajoj.

La kongresanoj ĝuis 10% je rabato ĉe la retkafejo «Esperanto», kiu troviĝis nur unu stratblokon for de la Hotelo Bamer. Ke ekzistas retejo kun tia nomo, kaj ke tiu nomo estis



***Sur la foto: la kongresanoj sur la ŝtupoj antaŭ la suna piramido. Dorse: Amanda Higley.***

elektita de la posedanto pro la signifo de Esperanto, estis tre agrabla surprizo!

Fakte oni trompis min: ne temis pri Tutamerika Kongreso, sed pri Universaleta Kongreso. Alvenis homoj el ĉiuj mondopartoj: eĉ el Nepalo... Inter la eminentuloj, kiuj partoprenis la Kongreson, estis S-ino Michela Lipari, Ĝenerala Sekretariino de UEA, S-ro Atilio Orellana Rojas, Komisiito de UEA por Ameriko, F-ino Vladka Chvatalova (TEJO), S-ro James Rezende Piton, S-ro Mark Fettes, gesinjoroj Bachrich, kaj multaj aliaj.

Ni profitis la okazon intervjui, inter aliaj, al Mark Fettes kaj al Normand Fleury.

Mia ĉefa tasko dumkongresa estis atenti la «ekspresan», fulman kurson pri Esperanto, ĉe Zócalo, tiu bela urbero. Ĉar temis pri mia unua sperto kiel instruisto de Esperanto, mi timetis pri la rezultoj: ne validis, ke mi estas instruisto pri aliaj fakoj de antaŭ 20 jaroj...

Tamen, dudeko da homoj ĉeestis la klasojn, kaj tri el ili eĉ fotokopiis libron de mi portita por pretigo de la lecionoj.

Kongresoj ĉiam estas bonega momento por prezento de literaturaĵoj kaj similaj, kaj oni kompreneble profitis la okazon prezenti la antologion je meksika poezio ***Floro kaj Kanto***, kompilita de Jorge Luis Gutiérrez, kaj ***Vivir en Babel***, de la sama aŭtoro, hispanlingva kompaktdisko pri la lingva problemo kaj Esperanto.

La Kuriero de la Nova Mondo, vigle redaktita de James Rezende Piton, krom raporti pri ĉiuj interesaĵoj, prezentis enigmon: kion signifas tiu kuniklo, kiu aperis kiel emblemo de la 5-a TAKE? La respondoj de la kongresanoj estis tre variaj, kaj iu el ili eĉ sugestis, ke temas pri esperantista kuniklo sidanta antaŭ komputilo kaj raportanta pri la Kongreso... Fakte la bildo estis eltirita el tre malnova meksika dokumento.



Ĉu mi forgesas ion? Aĥ, jes. Jen kelkaj pliaj sciindaĵoj:

Mark Fettes profitis la okazon prezenti interesan proponon pri ŝanĝoj en la strukturo de UEA.

La Belarta Konkurso (pentraĵoj) por Infanoj «Kiel mi vidas mian landon» estis inaŭgurita en la Salono Benito Juárez la 16-an de aprilo.

Fine de la Kongreso, Meksika Esperanto-Federacio kunsidis, kaj elektis novan prezidanton al Jorge Luis Gutiérrez.

Ŝajne temis pri ĝenerala sciindaĵo, ke Kubo estos la sidejo de la VI-a TAKE: neniu ŝajnis dubi pri tio, kvankam ankoraŭ la propono ne estis prezentita al la kongresanoj! Do, facile estos por Vi, leganto, diveni, kie okazos la 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, kies ĉeftemo estos: ***Kia Esperanto-movado por Ameriko?***

Ĝis revido en Kubo, amikoj!

***Alberto García Fumero***

# AktivAmeriko

http://www.geocities.com/espameriko


## Meksikurbo, 15-21 Apr. 2001

Kongresa temo: "Ameriko: unu kontinento, diversaj historioj"

5a Tut Amerika Kongreso de Esperanto

Jam aperis detaloj [illegible] por la Kvina Tutamerika Kongreso de Esperanto, de








# *Raporteto pri la pasinta Tutamerika Kongreso*

***Jen preskaŭ kompleta raporto (tute ne temas pri raporteto) pri la Kongreso, ricevita el Interreto. La Redaktoro permesis al si iomete ŝanĝi la stilon de la raporto... nur iomete, li asertas!***

Estimataj geamikoj:
Tre malfacile mi povas esprimi per vortoj tian amuzan, amikecan, ĝuigan kaj afablegan etoson kiel tiu travivita en Meksikio dum la ĵus pasinta Tutamerika Kongreso de Esperanto.

Unue, la granda gastigemo kaj sindono de la gemeksikanoj bele impresis min, tio certe helpis la sukceson de tiu evento.

Dum la antaŭkongresa semajno, mi akceptis kelkajn samideanojn en la flughaveno, sed

From cxastulo@yahoo.com Mon Jan 7 10:11:07 1980
Date: Sat, 5 May 2001 00:37:58 -0500
From: Ricardo Carrillo <cxastulo@yahoo.com>
Reply-To: landa-agado@yahoogroups.com
To: landa-agado@yahoogroups.com
Cc: bejo-listo@intl.egroups.com, usej-diskuto@yahoogroups.com,
Abeja <abeja@yahoogroups.com>
Subject: [landa-agado] Raporteto pri la pasinta Tutamerika Kongreso

bedaŭrinde kelkaj ne vidis min! Ho ve! Mi faris etan verdan flagon, kaj post tiam kiam mi informiĝis pri tiu problemo, do, mi faris grandan verdan flagon, facile videblan por miaj karaj alvenintaj samideanoj. Sed tio tute ne estis problemo, ĉio iris enorde.

Dum tiuj tagoj mi kaj Jimmer helpis la LKK-anojn pretigi lastminutajn aferojn por la kongreso. Kiom da entuziasmo kaj nervo!


Dimanĉe ni interkonatiĝis kun la aliaj gesamideanoj kaj komencis travivi tian amikecan etoson propra de Esperantaj eventoj.

S-ro Atilio Orellana komencis prelegi kaj diskutrondi pri la Esperanto movado, tre interesa temo al ĉiuj spektantoj.

Venonte, ĉiuj programeroj estis ege interesaj kaj buntaj: la interkona vespero, kiam multaj artistaj kongresanoj donis multe da ĝojo al la aliaj, ni lernis kanzonetojn, dancojn, rakontojn, poemojn kaj tre amuzan skeĉon fare de la kubanoj; la lecionoj pri dancoj, kiuj



Miro sur la pinto de la suna piramido. De maldekstre: Alberto García Fumero (Kubo), Anita Berg (Svedio), Ricardo Carrillo (Kolombio) kaj Vladka (Ĉeĥio)



La kialo de la miro estas memkomprenebla, ĉu? La piramido estas ja impona!

daŭris multe (ĝis frumateno!); ekspozicio de arto infana kaj junulara, tre diversa kaj mirinda; la oficiala malfermo, kun tre interesa indiĝena ceremonio kaj vortoj de la gravuloj tieaj: S-ino Mikela Lipari -Ĝenerala Sekretariino de UEA, S-o Atilio Orellana, S-ino Leonora Torres, Vladka Chvatalova, estroj de Meksikurbo kaj aliaj samideanoj...

Estis prelegoj pri diversaj temoj: la estonteco de nia movado, endokrinologio, arkitekturo, filatelo, historio, junulara movado, naciaj movadoj, kurseto pri la naŭatla lingvo, Cseh-metodo, ekzamenoj...

Tre grava estis la prezentado de la libro «Tra l'okuloj de l'venkitoj» («Visión de los vencidos»), de la grava meksika verkisto S-o León-Portilla, kaj tradukita de S-o Juan Jakobo Schmitter-Soto. La verkisto legis mesaĝon en Esperanto kaj montriĝis ege interesita pri nia kara lingvo kaj la nuna monda diskriminacio rilate lingvojn en la mondo.

Venis la meksika nokto, kun tipaj meksika muziko, dancoj kaj vestaĵoj; kelkaj samideanoj eĉ dancis sur la scenejo! Tre amuze!

Ekskurso al Soĉimilko: beleta lago kiun ni trapasis sur tipaj ŝipoj nomigitaj speciale por la okazo: Ludoviko, Esperanto kaj... mi forgesis la alian nomon, tiu de fama virino, ve! (- en vero la tria ŝipo nomiĝis MEF - ***La Redaktoro***); muzikero pri ĉambro-muziko, tre bela, mi speciale memoras eron nomata «La kato kiu dancas valson» pro ŝerco kiun faris Jimmer poste (la sono de la violono estis ege simila al krio de kato)...

Ekskurso al Teotiŭakano: tre fama kaj mirinda loko, plena je piramidoj kaj manfaraĵoj aĉetindaj. Sekvante al Ruben «Indiana» Torres, ni riskis eniri la sunan piramidon per flanka enirejo, tra tre malhela tunelo, tre memorinda sperto.

Ankaŭ: bela ĥoro kiu kantis tipajn kanzonojn, eĉ unu en la esperanta. Je la fino, la ĥoro omaĝis al ĥorano, temis pri tre kortuŝa momento; ekskurso tra la urbocentro, vidante multajn belajn lokojn kaj muzeojn...

Eksterkongrese, ni tagmanĝis kune, vizitis aliajn lokojn, aĉetadis, retumis ĉe la retkafejo «Esperanto» (jes, ĝi troviĝas nur unu blokon for de la kongresejo, kaj ĝia estro rakontis al ni pri ĝia nomo.)

Ankaŭ: konkurso pri oratorarto; solena fermo, kun multaj gratuloj pro la sukcesa kongreso, atestiloj al la partoprenintoj, fotoj, ridetoj... Kubo anoncis oficiale sin kiel venonta TAKE-ejo; la oficiala bankedo, kiam ni profitis muzikbandon kaj dancis la tutan nokton, tre amuze, je rondoj, grupaj dancoj...

Jen venis la 22-an de aprilo, dimanĉe, kiam ni vizitis la Antropologian Muzeon, tre granda kaj mirinda loko. Persone, mi ĉeestis tie dum pli ol tri horoj, lernante multe pri tutamerikaj kulturoj, ĉefe indiĝenaj el Meksiko. Tie la plej mirinda muzeaĵo estas la Azteka Suna

Ŝtono (Azteka Zodiako), tre fama kaj grava antropologiaĵo.

La 23-an, lunde, ni komencis la postkongresan ekskurson, rekte al Oahako.... nu, certe mi ne devas diri «ni», ĉar mi kaj Jimmer atingis la hotelon tre malakurate (kvankam ni eliris frue el nia gastigejo, sed pro tio, ke estis plej trafikkomplika horo, nek per taksio, nek per metroo, nek per kurado ni atingis ĝin akurate... nekredeble). Tio ĝenis ĉiujn multe, sed Amanda estis tiom zorgita, ke ŝi igis la ŝoforon reveni al la hotelo (kiam la buso jam estis survoje al Oahako)... sed ni ankoraŭ ne alvenis. Mi profitas la okazon por pardonpeti pro tio. Ĉiukaze, mi kaj Jimmer atingis Oahakon per alia buso.

Marde ni vizitis la vilaĝon Mitla, vidis ruinaĵojn kaj vizitis tipan familian entreprenon pri drinkaĵo nomata Mezkal', el agavo. Mi iĝis tradukisto samtempa (estis mia ununura sperto tia, verŝajne mi sukcesis) kaj vidis la plej dikan arbon en la kontinento (eĉ en la mondo).

Merkrede ni vizitis la ruinaĵojn kaj piramidojn en Monte Alban, tre bela loko. Certe oni povas spekti pacan kaj legendan indiĝenan ejon. Mi ekkonis praan sportejon, kie la indiĝenoj ludis la «pilkan ludon». Sed tio ne estis same kiel hodiaŭa ludo; ili adoris siajn diojn kaj la pilko trairis la sportejon kiel la suno trairas la spacon; temis pri religia afero por ili.

Pro tio ke la tempo flugis tre rapide, kaj ni vidis alveni la tempo forflugi al Kolombio (kaj aliaj al siaj landoj), ni apartiĝis el la oficiala ekskurso por koni meksikajn strandojn kiel tiuj de Kaŝita Haveno kaj Akapulko. Aliaj iris pli suden kaj vizitis Merida kaj Chichen Itza'.

Merkrede nokte, do, ni ĝisbaldaŭis niajn karajn gesamideanojn ĉe la hotelo, kaj subite, Amanda regalis al ni per belega kaj mildeta kanzono pri amikeco. Ŝi ploradis tiom ke preskaŭ ne povis kanti tiun kanzonon, tio tre multe kortuŝis nin. Certe tio estas unu el la plej belaj momentoj travivitaj iam en mia vivo, bela bela bela sperto...

Kaj jen la fino de la paradiza tempo! Revene al mia ĉiutaga vivo... ve!

Certe mi revas pri la venonta Esperanta evento kiam ni travivos denove tian etoson, plena je verdaj koroj.

Dankon Zamĉjo! Kaj vivantaj anĝeloj!

***Raportetis: Ricardo Carrillo (Kolombio)***

*Vi povas vidi kelkajn fotojn jam enretigitaj ĉe la jenaj retaj paĝoj:*
*http://web.mit.edu/quark/Public/meksiko/*
*http://take2001.8k.com/Take02.htm*

# Sciu



## La Ĝenerala Sekretario estas la Prezidanto...

Ne, ne temas pri eraro. Okazas, ke la Ĝenerala Sekretario de KEA, kiu laboras en la redakcio de la ĵurnalo «Habanero» (Havanano) fariĝis lastatempe la Prezidanto de la Nacia Rondo je Korektantoj ĉe Ĵurnaloj, Radio kaj Televido.

La celo de la Rondo, kreita la 23-an de decembro, 2000, estas konsciigi ĉiujn ĵurnalistojn pri la graveco de la laboro de korektantoj, instigi al klerigo kaj prestiĝigi ilian laboron.

## Tuthoraj elsendoj en Santiago

La Provinca Filio Santiago de Cuba disponos je unu horo ĉiusemajne (matene, de la 9:30 ĝis la 10:30) por informi en la hispana pri Esperanto. La radioelsendoj okazos kadre de la programo «...Y algo más» (... kaj io plia) en la loka radiostacio «Grito de Baire», kaj respondecos pri ili gesamideanoj Graciela Morgado kaj Jaime Ginarte Díaz.


## Nova Landa Reprezentanto de IKUE

Samideano Alberto García Fumero estas la nova Landa Reprezentanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista en Kubo. Interesitoj bv. kontakti lin ĉe la sidejo de KEA, aŭ rete al kubesp@ip.etecsa.cu.

## Korespondado: Kio okazas?

Ĉu neniu interesiĝas pri korespondado? Ni ne estas ricevinta petojn lastatempe...










Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro